

Heinrich Heine,
The Lorelei

tradukita de L. W. Garnham

I do not know what it signifies.
That I am so sorrowful?
A fable of old Times so terrific,
Leaves my heart so thoughtful.

The air is cool and it darkens,
And calmly flows the Rhine;
The summit of the mountain hearkens
In evening sunshine line.

The most beautiful Maiden entrances
Above wonderfully there,
Her beautiful golden attire glances,
She combs her golden hair.

With golden comb so lustrous,
And thereby a song sings,
It has a tone so wondrous,
That powerful melody rings.

...

Heinrich Heine,
Lorelej

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Ne scias mi, kial subita
malgaj' en la koro
naskiĝis;
el tempo jam enterigita
legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas
l' aero,
la Rejno mallaŭte
babilas,
per oro de l'sun' en vespero
la supro de l' monto
rebrilas.

Plej belan knabinon
mi vidas:
en ora ornamo brilante,
sur supro de l' monto
ŝi sidas,
la harojn mistere
kombante.

La oran kombilon ŝi
movas
kaj kantas tra l' pura
aero,
kaj forto mirinda sin
trovas
en tiu ĉi kant' de
l'vespero.

...

Heinrich Heine,
Lorelay

tradukita de Hans-Georg Kaiser

Min kaptas malgaj'
en la koro,
pro kio tia trist'?
Fabel' el antikva foro
ne lasas de mi kun
persist'.

Aere fridetas, trankvilas,
malhelas jam la Rejn'.

La monto surpinte
brilas
vespere en rava scen'.

Tre ĉarma feino sidas,
jen supre por ador';
la ora ornamo ridas;
ŝi kombas harojn el
or'.

Ŝi kombas per ora
kombilo
kaj kantas kun pasi';
mirigas min la elbrilo
kaj forto de l' melodi'.

...

Heinrich Heine,
Lorelejo

tradukita de Joachim Gießner

Malgajon mi sentas
en koro,
sed kial tia tim' ?
Legendo el pratempa
foro
Vagadas tra mia
anim'.

Jam fluas la Rejn' en
malhelo,
kaj malvarmetas l'
aer'.

Sed brilas la mont' en
orbelo
pro suna lum' de l'
vesper'.

Jen supre kabino provokas
per ora juvelar',
kaj ŝia beleco allogas
kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas
sorĉige,
sirene kantas ŝi
per neimagebla, mirige
potenca melodi'.

...

The shipper in the little ship It effects with woe sad might; He does not see the rocky slip, He only regards dreaded height.	Ŝipet' iras sur la rivero, ŝipisto ekstremis de l' kanto, kaj blinda por ĉiu danĝero rigardas li al la kantanto.	Ŝipisto ŝipeton gvidas, lin kaptas ve' de ekzalt'. Li ja la rifojn ne vidas', li vidas nur supren sen halt'.	Ŝipiston en eta boato Turmentas koremovi'. Ne ĝenas lin rifikaskado, rigardas nur supren al ŝi!
--	---	---	--

I believe the turbulent waves Swallow the last shipper and boat; She with her singing craves All to visit her magic moat.	Ha, baldaŭ ŝipisto la bela perdiĝis sub l' akvoturnado; ĝin Lorelej' faris kruela, per sia mirinda kantado.	Mi kredas, ke ondoj tiras la ŝipon funden de l' Rejn'; kaj tio de l' kant' eliras de Lorelaj-siren'.	Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo la ondoj lin kun boat'. Nun kuŝas li en la profundo pro Loreleja kantad'.
--	--	---	---

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en la Anglan de L. W. Garnham.*

Arg-2-14 (2003-10-11 23:04:57)

L. W. Garnham, Bachelor of Arts, LEGENDS OF THE RHINE; mentioned in: A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leipzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html>.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).*

Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)

Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kantokolekto "Mia kantaro I", eldonita de Josef Schiffer (Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: Josef.Schiffer@t-online.de), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo "Fervoja Esperantisto" de Germana Ferjojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.